

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

Nº 3 (58) junio 2010



en la numero *decidoj de la Konferenco kaj planoj de la nova Estraro*
la denaskuloj respondas
novaj disertacio kaj diplomverko pri Esperanto
nekonataj poemoj de Aleksandr Logvin
75-jariĝo de Vladimir Samodaj kaj 60-jariĝo de Viktoro Kandalinskij
“Ludi militon” de Gudrun Pausewang en traduko de Nora Caragea
nova eldono de “Dek tagoj de kapitano Postnikov”
“Bulteno de REU”, novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2010

enhavo

- 01 *Malferme al esperantistoj (G.Arosev)*
- 02 *La denaskuloj respondas*
- 05 *Disertacio pri Esperanto*
- 06 *Traduki rime proverbon – evoluos la cerbo (A.Gončarov)*
- 14 *Nova diplomverko pri Esperanto*
- 15 *Ni ludu! (Lingva Festivalo en Uljanovsk)*
- 17 *Naciaj diraĵoj E-veste (parto 8)*
- 21 *Eventoriĉaj tagoj (M.Karceva)*
- 22 *Forpasis V.M.Hmelinskij*
- 23 *Decidoj de la 25-a Konferenco de REU*
- 23 *Taskoj de REU-Estraro*
- 24 *Malferma tago spite la cindran nubon*
- 25 *Havana UK super Portlando kaj Vankuvero*
- 25 *Estrara Raporto de UEA: panoramo de la Zamenhof-jaro*
- 26 *Komitatanoj B elektitaj*
- 26 *REU-membroj por 2010*
- 27 *Kotizoj de REU/REJM por 2010*
- 29 *Okaze de la jubileo de Simbirska Esperanto-societo*
- 30 *La 22-a “Aroma Jalto”*
- 31 *Al seminario en Harbino*
- 33 *Pacmuzeajn salutojn el Samarkando!*
- 33 *Elektio de triono de la akademianoj*
- 34 *Literatura konkurso “Liro-2010”*
- 34 *“La trezoro”: fenestro al la islama kaj araba kulturo*
- 35 *“Nemeza” de A.Nobel – en la rusa kaj Esperanto*
- 36 *Nova ĉapitro el “La urbo Goblinsk” (M.Bronŝtejn)*
- 43 *Nekonataj poemoj de Aleksandr Logvin*
- 47 *“Ludi militon” – rakonto de Gudrun Pausewang en traduko de Nora Caragea*
- 52 *60-jariĝo de Viktoro Kandalinskij*
- 13, 28, 30, 42, 46 *Anekdotoj*
- k3 *Novaj libroj de “Impeto”*
- k4 *75-jariĝo de Vladimir Samodaj*



*nova Prezidanto de REU
Grigorij Arosev*

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

Nº 3 (58) junio 2010

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Griŝin

*materialoj de REGo povas esti
represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos
senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

poŝta adreso: Pjaticnikoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2010:

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj
de KŜŜ – 350 rubloj sendendaj al:*
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj
pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

Novaj libroj de “Impeto”

Vladimir Samodaj. Esperanto kaj Vivo. – Moskvo: Impeto, 2010. – 248 paĝoj, ilustrita. Kovrilo de Anastasia Bašlikova. ISBN 978-5-7161-0212-5.

La ĵus aperintan libron de Vladimir Vladimiroviĉ Samodaj esperantistoj ekcelis pli frue, ol ĝi aperis en librovendejoj. La kvanto de la venditaj libroj en junio superis tiun de lernolibroj kaj vortaroj. Ĉu strange? Tute ne, ja la aŭtoro estas konata kiel unu el la plej talentaj literaturaj stilistoj. Des pli, ke liaj verkoj, prozaj aŭ poeziaj, aperas ne tiom ofte. (La eldonita en 1999 “Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM” preskaŭ tuj fariĝis bibliografia raraĵo).

“Mi rakontos nur tion, kion mi bone scias-memoras, fojfoje pruvante tion per dokumentoj... Ĝi enhavas ankaŭ fragmentojn el mia neesperantista vivo. ... nenio el tiuj fragmentoj kaj epizodoj estas inventita, ĉio estas aŭtentika vero, eĉ se ne tro kredinda... verku viajn rememorojn dum vi vivas”, – sentencas la aŭtoro en la komenca ĉapitro “Nia nuntempo estos iama historio”.

Sian antaŭparolon al “Esperanto kaj Vivo” akademiano Boris Kolker kronas per jenaj vortoj: “Okaze de la 75-jariĝo de Vladimir Samodaj, honora membro de Universala Esperanto-Asocio, mi deziras al li bonan sanon, pluan energion kaj multajn legantojn de tiu ĉi libro”. Restas por ni nur aliĝi al tiuj bondeziroj.

Mikaelo Bronŝtejn. Dek tagoj de kapitano Postnikov. Romano. Dua eldono, reviziita kaj korektita. – Moskvo: Impeto, 2010. – 352 paĝoj, ilustrita, bindita. Ilustraĵoj de Anastasia Bašlikova. Sur la kovrilo pentraĵo de Ivan Ajvazovskij. ISBN 978-5-7161-0211-8.

Al la legintoj de la unua eldono la aŭtoro rekomendas tralegi ankaŭ la duan, ĉar la teksto estas konsiderinde reviziita kaj kompletigita per la plej grava parto de la materialoj, kiujn la aŭtoro akumulis dum la jarkvino. Diverslandaj esperantistoj sendadis al M. Bronŝtejn novajn materialojn pri Postnikov, kaj inter ili estas tre gravaj, kiel, ekzemple, la portreta foto de la protagonisto, aŭ Puŝkina “Mocart kaj Saljeri”, tradukita de alia grava rolulo de la romano, Vsevolod Lojko. (Ni notu, ke en la unua eldono anstataŭ Lojko verkis la aŭtoro mem.) Post apero de la ruslingva traduko la aŭtoro ricevis notojn ankaŭ de ĵurnalistoj-historiistoj, povis revizii la tekston ankaŭ helpe de tiuj notoj kaj uzi aldonan raran fotomaterialon pri la urbo Tihvin.

Tiu bonkvalita eldono aperis en la jubilea jaro 2010 – la jaro de centjariĝo de la Unua Ruslanda Esperantista Kongreso.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)






75
jubilea jaro 2010



Vladimir Samodaj

PRINTEMPO VENIS...

ESPERANTO KAJ VIVO



NOVA LIBRO

*Printempo venis. Jam la sepdekkvina.
La vivo daŭras. Ĝia tago fina
Pli proksimiĝas... Tamen tiu tago
Por mi ne estos katastrofa plago,
Ĉar estas ĝi natura fenomeno.
Naskiĝo, vivo, morto – estas ĉeno
De ĝeneralaj leĝoj de l'ekzisto,
Do malnecesa estus plora tristo
Pro ĝia veno, ĉar jam vivas nova
Generacio – juna, saĝa, pova
Plenumi tion, kion mi ne faris,
Ne povis aŭ banale fortojn ŝparis.
Deziras mi, ke la genepoj junaj
Ekzistu en kondiĉoj oportunaj,
Feliĉu, pacu, en la rond' amika
Atingu ĉion kun sukces' efika.*

*Kaj mi plu vivu – ĝis la tago fina.
Printempo venis. Nur la sepdekkvina...*

Eldonejo «Impeto»
impeto.trovu.com

18.04.2010.
Vladimir Samodaj